

Otto Julius Bierbaum,  
Amletero

*tradukita de Paul Bennemann*

En malproksimon for,  
super la montojn for,  
trans ĉiujn tagojn kaj noktojn for  
kantas mi al vi, amatino –  
aŭdu min!

Aŭdu susuron de l' arboj en pluvo;  
aŭdu la venton tuŝantan la herbejon  
per karesa flugilo ŝvebante;  
aŭdu obtuzan ĝemon de l' nokt':  
aŭdu vin mem –

Aŭdu kun revaj okuloj; aŭdu,  
aŭdu en vi muĝantan la koron  
kaj vian sangon:  
ĝi portas mian voĉon  
kaj mian amon tra tuta via vivo.  
Al vi, pro vi sonas voko;  
krio de amplena animo  
serĉas vin, amatino – aŭdu min!

En malproksimon for,  
super la montojn for,  
trans ĉiujn tagojn kaj noktojn for  
kantas la kor', amatino,  
kantas la koro al vi!

...

Otto Julius Bierbaum,  
Liebesbrief

Über die Ferne hin,  
Täler hin, Berge hin,  
Durch alle Tage und Nächte hin,  
Sing ich zu dir, o Geliebte.  
Hörst du mich?

Lausche dem Rauschen der Bäume im Regen,  
Lausche dem Winde, der über die Halme  
Mit dem zärtlichen Fittiche hinstreift,  
Lausche dem holden Munde der Nacht;  
Lausche in dich.

Lausche geschlossenen Auges, höre,  
Höre dein Herz, das rauschende, höre,  
Höre dein Blut: es trägt meine Stimme,  
Trägt meine Liebe durch all dein Leben:  
Zu dir, um dich  
Tönt mein Rufen,  
Tönt meine sehnsuchtsvolle Seele,  
Die dich sucht.

Über die Ferne hin,  
Berge hin, Täler hin,  
Durch alle Tage und Nächte hin  
Sing ich zu dir, o Geliebte,  
Singt meine Seele zu dir.

...

Otto Julius Bierbaum,  
Liebesbrief

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En malproksimon for,  
Super la montojn for,  
Trans ĉiujn tagojn kaj noktojn for  
Kantas mi al vi, ho amatino.  
Ĉu vi aŭdas min?

Aŭskultu la susuron de l' arboj en pluvo;  
Aŭskultu la venton, kiu super la gren-tigoj  
Per karesa flugilo ŝvebas;  
Aŭskultu la ĉarman parolon de l' nokto:  
Aŭskultu vin mem.

Aŭskultu kun fermitaj okuloj; aŭdu,  
Aŭdu vian muĝantan koron  
Kaj vian sangon: ĝi portas mian voĉon,  
Ĝi portas mian amon tra tuta via vivo:  
Al vi, pro vi  
Sonas mia voko,  
Sonas mia sopirplena animo,  
Kiu vin serĉas.

En malproksimon for,  
Super la montojn for,  
Trans ĉiujn tagojn kaj noktojn for  
Kantas mi al vi, ho amatino,  
Kantas mia animo al vi.

...

*Traduko de la Germana poemo "Liebesbrief" de OTTO JULIUS BIERBAUM (\*1865-06-28 – †1910-02-01) en Esperanton de PAUL BENNEMANN (\*1885-03.13 – †1954) en 1933.*

*Arg-525-1034 (2013-04-10 15:40:33)*

*Tiu ĉi Esperantigo de la poemo troviĝis presita en la revuo „Heroldo“, n-ro 40 (745) de l' 8a de oktobro 1933. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul\\_Bennemann](http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bennemann)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas OTTO JULIUS BIERBAUM (\*1865-06-28 – †1910-02-01).*

*Arg-525-1033 (2010-03-03 16:31:32)*

*Das Gedicht ist zu finden unter <http://www.deutsche-liebeslyrik.de/bierbaum.htm#g43> und <http://www.zeno.org/Literatur/M/Bierbaum,+Otto+Julius/Gedichte/Ausgew%C3%A4hlte+Gedichte/Gemma/Zwei+Liebesbriefe/1.+%5B%C3%9Cber+die+Ferne+hin%5D>.  
Hinsichtlich des Verfassers siehe: [http://de.wikipedia.org/wiki/Otto\\_Julius\\_Bierbaum](http://de.wikipedia.org/wiki/Otto_Julius_Bierbaum).*

*Traduko de la Germana poemo "Liebesbrief" de OTTO JULIUS BIERBAUM (\*1865-06-28 – †1910-02-01) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2010-03.01.*

*MR-492-01 / Arg-525-1035 (2010-03-05 10:20:30)*

*La unua Esperantigo de la poemo troviĝis presita en la revuo „Heroldo“, n-ro 40 (745) de l' 8a de oktobro 1933. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul\\_Bennemann](http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bennemann). Mi, Manfred Retzlaff, provis traduki la poemon denove; ĉar mi pensas, ke la traduko de Paul Bennemann (13.03.1885 – 1954) ne sufiĉe agordas kun la originalo.*